

Kiel la programado povas influi la instruadon de esperanto

Claude Gacond, 329-a radioprelego, 1970.01.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni donis kelkajn ĝeneralajn informojn pri la historia graveco de la analiz-metodo nomata **programado**. Ni hodiaŭ ekzamenus, kiel la programado povos influi la instruadon de esperanto.

A.- Programisto devas precize difini siajn intencojn. Kiam li ekprogramas, li devas precizigi, por kiu li eklaboras.

Cl.- Ekzemple nia kurso de esperanto, kiun ni programas, celas franclingvanojn. Plie ĝi estas elementa kurso. Tio signifas, ke ĝi ne ĉion instruas. Ĝi limigas sian instruon al la ĉefaj lingvaĵoj, kies kono estas necesa por povi kompreni normalan konversacion, por povi legi facilan libron kaj respondi al kutima letero.

A.- Franclingvanoj, jen esprimo, kiu entenas homojn ege variajn. Ekzistas franclingvanoj, kiuj konas plurajn fremdajn lingvojn kaj ilin flue parolas ; estas franclingvanoj, kiuj ne havis la okazon lerni fremdajn lingvojn ; ili povas havi klaran komprenon pri la gramatikaj fenomenoj aŭ havi nur tre nebulan konon pri tiuj fenomenoj ; ili povas bone majstri la francan lingvon, aŭ ili ĝin fuŝe skribas.

Cl.- La kurso, kiun ni verkas, celas ĉiujn tiujn homojn. Pro tio ni redaktas ĉapitrojn, kiujn la personoj, kiuj havas sufiĉajn lingvajn kaj gramatikajn konojn, povos salti. Pri tio decidus testoj.

A.- Tiel la lernantoj, kiuj jam lernis aliajn lingvojn, tre rapide antaŭeniras. La aliaj lernantoj ricevas multe pli da informoj kaj progresas laŭ pli trankvila ritmo. Tiel ĉiuj estas kontentaj. La lertaj lernantoj ne perdas sian tempon. La malpli lertaj estas kontentaj povi ricevi instruadon, kiu estas facile digestebla.

Cl.- Estis necese decidi pri la aĝo de la lernantoj. Vi eble scias, ke ĉirkaŭ la 12-a jaraĝo la infanoj travivas mensan mutacion. Antaŭe ili ne kapablas pensi abstrakte, kaj pro tio malfacile sekvas argumentadon. Post tiu mutacio ili forlasas la mondon de la infaneco por la mondo de la abstrakta penso. Nia kurso nur konvenas al personoj, kiuj travivis tiun pensmutacion. Tio ne signifas, ke ni kontentiĝas abstrakte argumentadi. Kontraŭe. Ni antaŭeniras per paŝetoj kaj multaj ekzemploj akompanas la klarigojn. Tamen tiu kurso ne konvenus por instrui al infanoj malpli ol 12-jaraj aŭ al plenkreskuloj, kies mensa evoluo ne estas kompleta.

A.- Jen pri la situacio de la kurso. Por la germanlingvanoj nun laboras en la sama direkto sinjoro Hermann Behrmann. Ĉar li laboras por aliaj lingvanoj, lia kurso jam nur pro tio malsimilas de la nia. Nia kurso estas programita por franclingvanoj, la lia por germanlingvanoj. Poste la celoj eble ankoraŭ disas, kio pliigas la diferencojn.

Cl.- Kiam programisto difinis la celojn de sia laboro, li tiam komencas ĝeneralan analizon. Ni donos kelkajn ekzemplojn pri nia analizado. Se ni redaktus kurson de la angla, ni devus listigi la frazojn, kiujn ni volus instrui. Esperanto ne povas esti instruata, kiel oni instruas la anglan. Anstataŭ listigi frazojn asimilendajn, oni devas listigi radikojn, afiksojn kaj finiĝojn, kies kunludo devas esti regata.

A.- Do nia unua laboro estis listigi tiujn elementojn. Ni troviĝis antaŭ vortlistoj, kiuj ŝajnis al ni arbitraj. Unue ekzistas la radikaro de Zamenhof kaj la fundamenta radikaro. Sed fakte la lingvo evoluis de post ilia redaktado. Pierre Bovet, kiu gvidis la unuan kampanjon por la instruado de esperanto en la lernejoj, estas la aŭtoro de alia radikaro. Tiu listo estas la plej bona instrumento. La listoj de Blaas kaj de UEA estas malpli ekvilibritaj. Tamen la listo de

Kiel la programado povas influi la instruadon de esperanto
Claude Gacond, 329-a radioprelego, 1970.01.28 & 31

Pierre Bovet ne povis kontentigi nin. Kiel la aliaj listoj ĝi estas tro lernejeca. En ĝi esperanto restas fremda lingvo, kie la ĉiutagaj esprimoj forestas profite al pli ĝenerala vortaro.

Cl.- Dank'al la kunlaboro de laboremaj esperantistoj ni iom post iom kalkulis la radik-oftecon en multaj facilaj tekstoj de bonaj aŭtoroj. Ni tiel akiris liston, kiu permesis kompletigi la ĵus menciitajn radikarojn. Ni multobligis tiun liston sub la titolo *Provizora fundamenta radikaro por la programita kurso*. En ĝi forestas radikoj, kiujn ni ne povis trovi en la analizitaj tekstoj, kaj kiuj tamen estas ege gravaj en parola uzo de esperanto. Pro tio ni iom post iom kompletigas tiun provizoran liston.

A.- Pro puritanismo ĉiuj radikoj, kiuj permesas paroli pri amo, pri malsanoj kaj pri fekaĵoj estas for el tiuj listoj. Sed se oni registras dum unu sola vespero babiladon inter gejunuloj aŭ eĉ inter tre dignaj personoj, oni konstatas, ke tiuj radikoj, kiuj forestas el la oficialaj listoj, estas pli fundamentaj, ol oni povus opinii. Unu el la kaŭzoj de la stagneco de la esperantaj grupoj ĝuste troviĝas en tiu puritanismo, kiu forpelis konversaciajn temojn, kiuj fakte troviĝas je la centro de la homaj priokupoj. En programita kurso tiuj esprimoj, kiuj permesas partopreni ŝercajn babiladojn, devas havi lokon.

Cl.- Pardonu, sed radikoj kiel **furzi** kaj **rukti** estas almenaŭ tiel fundamentaj kiel **partio** kaj **preĝi**, kiuj troviĝas en ĉiuj listoj. Pro tio ni iom post iom aldonas tiujn vortojn al la fundamenta vortlisto.

A.- Samtempe ni devis konstati, ke sufiksoj, kiuj estas instruataj en ĉiuj lernolibroj, fakte ludas ege malgravan rolon. Ni menciu la sufikson **ing**, kiu permesas formi **kandelingo** aŭ **cigaredingo**. Dume forestas klarigoj, kiuj permesas scii, kial oni diras **Universala** Esperanto-Asocio, kaj ne **Universa** Esperanto-Asocio. Tiu pseŭdosufikso **al**, kiun ni retrovas en **horizontala**, **radikala**, kaj tiel plu, montriĝis ege ofta. Programita kurso tutcerte devos doni indikojn pri ĝi.

Cl.- Tiu analiz-periodo, kiu listigas la instruendajn aĵojn forrabas multe da tempo. Ni eĉ asertas, ke la valoro de programita kurso dependas de tiu analizo. Se programisto kontentiĝas ripeti, kion li trovis en la aliaj lernolibroj, lia laboro estas vana. Rapidege ĝi estos eksa.

A.- Poste tiuj vortoj devas esti dividitaj en kategoriojn. Ni havas radikojn, kiuj ne estas fremdaj al la franclingvanoj, kiel ekzemple **elefanto**, **Ameriko**, **homo**, **avara**, **granda**, **naiva**, **prezidi**, **rikolti**, **riski**, kaj tiel plu.

Cl.- Ekzistas aliaj radikoj, kiuj estas fremdaj al la franclingvanoj : **hundo**, **bunta**, **dum**, **kluki**, **neniam**, kaj tiel plu. Ili ne povas estis instruataj sammetode, kiel la unuaj.

A.- En tria kategorio ni trovas radikojn, kies signifo estas limigita rilate al la signifo propra al la franca lingvo : oni ne **demandas**, sed **petas** konsilon, estas diferenco inter **afabla** kaj **ĝentila**, inter **virino** kaj **edzino**, inter **knabino** kaj **filino**, kaj tiel plu. Tiujn aferojn devas instrui programita kurso.

Cl.- Tiu prepara analizo daŭris por ni plurajn jarojn. Dum tiu periodo ni nin ĉirkaŭis de bonaj konsilantoj, kiuj nun nin multe helpas en la redakta analizo.

A.- Pri tiu analizo nomata **programado** ni raportos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-